# tejo:aktuale

n°517 | Junio 2026

**Karaj abonantoj, bonvenon al la junia numero de TEJO-aktuale!**

En Roterdamo la temperaturoj altiĝas, sed la laboro en la Centra Oficejo ne malrapidiĝas. Inter preparado de filmetoj por Instagramo kaj pakado de skatoloj por sendo al UK, la volontula teamo jam direktas sian rigardon al la venontaj agadoj. Baldaŭ ni vojaĝos al Danio por partopreni en la Roskilde-muzikfestivalo, kie TEJO denove havos la okazon prezenti Esperanton al internacia publiko.

En tiu ĉi numero vi trovos novaĵojn, aktualajn alvokojn kaj ĝisdatigojn pri la lastatempaj kaj venontaj agadoj de TEJO. Agrablan legadon kaj ĝis la venonta renkontiĝo en Esperantujo! 🌍

## ALVOKOJ




### Estu parto de nia gvida teamo!

Hodiaŭ estas **la lasta tago por kandidatiĝi al la Estraro de TEJO** por la mandato 2026–2027**.** Ĉu vi volas aktive kontribui al la internacia junulara Esperanto-movado? Vi povos kunlabori pri kampoj kiel kongresoj, edukado, informado, teknologio, Pasporta Servo, volontuloj, ktp.

Por kandidatiĝi, sendu **hodiaŭ** mesaĝon al elekta.komisiono@tejo.org kun:
Vivresumo
✍ Motiviĝletero
📬 Rekomendletero

Pli da informo estas en nia retejo.




### Volontulu en Roterdamo!

Ĉu vi ne sentas vin preta esti gvidanto de TEJO, sed ŝatus esti parto de nia teamo? TEJO serĉas 3 plentempajn volontulojn kadre de Eŭropaj Solidaraj Korpusoj (ESK) por labori en la Centra Oficejo en Roterdamo. Dum la volontulado vi povos kontribui al internaciaj projektoj, eventoj, informado, sociaj retoj, reprezentado kaj multe pli – en la koro de la Esperanto-

movado.

Komenco (ideale): oktobro 2026

Legu pli pri la ESK-volontulado kaj **kandidatiĝu hodiaŭ** (lasta tago) ĉe kandidatigxoj@tejo.org.




## Donackampanjo

TEJO bezonas vian helpon! Ĉi-jare TEJO ne ricevis la administran subvencion de Eŭropa Unio – subteno kiu ĉiujare helpas nin bone funkciigi la organizon. Tio signifas ke nun ni devas pli forte fidi je nia komunumo kaj helpi unu la alian. Ĉar sen tiu mono, eventoj kiel IJK aŭ projektoj kiel Esperanto Senlime kaj ankaŭ la normala oficeja laboro fariĝas multe malpli certaj.

TEJO estas ne nur organizo, ĝi estas komunumo, spertoj, amikecoj kaj projektoj kiuj ekzistas ĉar homoj decidas sindediĉi al ili. Do, se TEJO iam donis ion al vi, eble nun estas la momento helpi ankaŭ TEJO-n.

Subtenu TEJO-n!

---

# ANONCOJ




## Kipre kaj kune!

De la 25-a de novembro ĝis la 1-a de decembro 2025, TEJO organizis la seminarion "Junuloj por Eŭropo: Trejnigante la morgaŭajn packonstruantojn per enrigardoj en la pasintecon" en Pervolia kaj Nikozio, Kipro, kunlabore kun la Konsilio de Eŭropo kaj la Kipra Junulara Konsilio.

Kadre de la projekto, la partoprenantoj kunlaboris kun kipraj junuloj por krei filmeton pri la lingva diverseco de la insulo kaj la komplekseco de la kipra socio. La filmeto estas unu el la rezultoj de tiu komuna lernado kaj dialogo. Spektu ĝin en nia jutuba kanalo! ☮




## Aperis la filmeto de #KuriPorKONGO!

Dum IJK en Indonezio okazis la iniciato #KuriPorKONGO, donackurado por subteni la esperantistan movadon en Kongo. En 2025 ĝi okazis cetere dum KEKSO en Kirkel, dum la Roskilde-festivalo, dum UK en Brno kaj ankaŭ dum FESTO en Moissac. La

donacoj helpis esperantistojn de DR Kongo aĉeti komputilojn kaj lernomaterialojn, por faciligi laborserĉadon kaj ankaŭ ebligi al ili instrui al samlandanoj kaj kundividi konon pri diversaj temoj (inkluzive de alfabetigo).

**Dankon** al ĉiuj, kiuj kuris, donacis aŭ helpis organizi la iniciaton!

Spektu la filmeton en nia jutuba kanalo por lerni pli pri la kampanjo!

---

# EVENTOJ




## Universala Kongreso de Esperanto

1-8 de aŭgusto 2026
Graz, Aŭstrio

**Ni preparas multajn junularajn programerojn!** La programo inkluzivos interalie TEJO-bingon, tabloludojn, dancigan videoludon Just Dance, aligatorejon, karaokeon kaj piknikon sur la monteto Schlossberg.

Dum la unua sabato ni planas **komunan vespermanĝon** kun senlima bufedo en unu el la lokaj aziaj restoracioj. Se vi ŝatus partopreni, nepre aliĝu: http://mallonge.net/25q

Dum la ekskursa tago ni planas **montaran ekskurson al Bärenschützklamm**, unu el la plej belaj naturaj lokoj en la regiono. La ekskurso estas malferma por junuloj de la kongreso, sed bezonatas aliĝi: http://mallonge.net/25r

La kulmino de la semajno estos la tradicia **futbalmatĉo**, kiu okazos ĵaŭdon. Ni nepre bezonas ludantojn kaj trejniston – se vi volas kontribui al almenaŭ unu venko de Esperanto, kontaktu Marta: marta@esperanto.at

La junulara programo estas malferma kaj fleksebla, kaj partoprenantoj povas aliĝi al unuopaj aktivaĵoj laŭ siaj interesoj kaj energinivelo. Krome, ĉiutage disponeblos tabloludoj por tiuj, kiuj volas simple kunludi kaj babili en malstreĉa etoso.

Ĉu vi ankoraŭ ne aliĝis al UK? Restas nur 1 monato! **Aliĝkotizoj estas rabatitaj por membroj de TEJO:** junuloj inter 20 kaj 30 jaroj ĝuas rabaton por la aliĝkotizo, kaj junuloj sub 20 jaroj aliĝas senpage.

Aliĝu ĉe uk.esperanto.net kaj sekvu la novaĵojn en Instagram, Facebook kaj Telegram!




## Internacia Junulara Kongreso

9-16 de aŭgusto 2026
Tiana, Katalunio (Hispanio)

Partoprenu en la 82-a IJK por sperti tre raran plenan suneklipson, ĝui regionon riĉan pri kulturo, historio kaj gastronomio, kaj pasigi varman someron ĉe belaj plaĝoj kaj verdaj arbaroj kun esperantistoj de la tuta mondo!

Jen eta bonveniga filmeto por ke vi povu koni La Conreria, la kongresejon de IJK 2026.😍


Vi povas aliĝi al la oficiala babilgrupo kaj aboni nian informkanalon en Telegramo. Se vi havas demandojn aŭ proponojn, simple alskribu nin.

Venu pasigi eksterordinaran kaj memorindan someron kun ni!

**Trovu pli da eventoj en Eventa Servo!**

# tejo: ~~aktuale~~ eventuale

La plej freŝaj novaĵoj kaj ĝisdatigoj el la TEJO-mondo. ⚡




### 💰 Rekorda donaco por TEJO

La Centra Oficejo lastatempe ricevis surprizan mesaĝon de mondfama entreprenisto kaj filantropo, kiu esprimis sian deziron subteni TEJO-n per **donaco de 17 milionoj da eŭroj**. La donaconto, kiu petis resti anonima sed subskribis la mesaĝon per la inicialoj **T. Swift**, klarigis ke ŝi ekinteresiĝis pri Esperanto post hazarde trovi verdan stelon en sia ĝardeno. Krom la donaco, ŝi ankaŭ demandis ĉu ankoraŭ eblas aliĝi al la **venonta IJK** kaj ĉu la partoprenantoj kutime interŝanĝas

amikecajn braceletojn.





### Aliĝu al la TEJO-koruso!

La volontulo Konrad' fiere anoncas la lanĉon de "Miksitaj Nuksoj", la unua **oficiala TEJO-koruso**. Antaŭa sperto pri kantado ne necesas; fakte, laŭ la organizantoj, ĝi eĉ povus malhelpi la kreivan procezon. Por aliĝi, **sendu filmeton de vi kantante La Espero al oficejo@tejo.org.**




### Mendu vian personan pinglon!

TEJO finfine lanĉas sian personigitan **pinglo-servon**. Nun vi povas mendi pinglon kun via vizaĝo, via kato, la vizaĝo de via kato sur via vizaĝo, aŭ artisma interpreto de via plej ŝatata gramatika eraro. La kolektista eldono inkluzivas enkonstruitan sensilon kiu ekbrilas ĉiufoje kiam iu diras: "Mi komencis lerni Esperanton antaŭ nur ses monatoj..." antaŭ perfekte flua parolado.




### 📚 Amuza fakto de la monato

Ĉu vi scias, ke Zamenhof iam laboris kiel **provleganto** por TEJO? La kunlaboro tamen ne daŭris longe. Laŭ arkivaj dokumentoj, li ricevis tri sinsekvajn avertojn pro "**mankantaj akuzativoj**" kaj pro tio, ke li daŭre korektadis jam aprobitajn tekstojn.




Kiel membro de TEJO, vi subtenos nian junularan movadon, ricevos la revuon *Kontakto* kaj rabaton al IJK kaj aliaj eventoj. Vi havos la eblon partopreni en trejnadoj kaj projektoj kaj kundecidos pri nia agado. Vi povos ankaŭ aktive kontribui al TEJO partoprenante en la Komitato aŭ niaj komisionoj.

Ĉu vi volas kontribui sendante interesajn novaĵojn por la venonta numero de TEJO-aktuale? Sendu viajn novaĵojn al info@tejo.org antaŭ la 23-a tago de la monato. Antaŭdankon pro la helpo!

## Kolofono

***TEJO-aktuale*** estas retpoŝta informilo de TEJO. Ĝi estas senpage abonebla, aperas unufoje monate kaj koncize kompilas freŝajn, konkretajn informojn pri la junulara E-movado kaj ligilojn al interesaj retpaĝoj – pli rapide ol povus tion fari paperaj revuoj.

**Redaktoro:** TEJO-volontuloj
**Eldonas:** Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO) · tejo.org

*Kopirajto © 2026 TEJO*

*Ĉi tiu laboro disponeblas laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite-Samkondiĉe 4.0 Tutmonda*

Ĉu vi volas ŝanĝi kiel ricevi ĉi tiujn retpoŝtajn mesaĝojn? Vi povas ĝisdatigi viajn agordojn aŭ malaboni la retpoŝtan bultenon.

This email was sent to <<Retpoŝtadreso>>
*why did I get this?* unsubscribe from this list update subscription preferences
Tutmonda Esperantista Junulara Organizo · Nieuwe Binnenweg 176 · Rotterdam, Zh 3015BJ · Netherlands